

**VERDA INFORMILO, n-ro. 8/2018, 13a de
aŭgusto 2018
GRÜNER BOTE, 8/2018, 13. August 2018**

**estas la oficiala informilo de estraroj de Landa Asocio
Meklenburgio-Antaŭpomerio (LAMA) kaj Esperanto-Societo
Neubrandenburg (ESN)
ist das offizielle Mitteilungsblatt der Vorstände des LVMV und
EVN
www.esperanto-nb.de, info@esperanto-nb.de**

1. Ĉijara 41-a SEFT

De la **14-a ĝis la 21-a de julio 2018** okazis la ĉijra SEFT. Partoprenis ĝin 44 personoj el kvar landoj, nome Germanujo, Nederlando, Svislando kaj Danujo.

Sub gvido de Diana okazis la jenaj programeroj:

- konstruado de la komuna tendego,
- diversaj vespermanĝoj:
 - internacia vespero,
 - patkuko-festo,
 - supo el kaldronoj,
 - adiaŭa vespero kun varia bufedo,
- nokta migrado,
- Esperantokurso kun Diana kaj René,
- fabelhoru (bedaŭrinde tro malofte),
- Hobiaj subakviĝantoj havis sufiĉe riĉan programon.
- Okazis diversaj migradoj:
 - 625 jaroj Thomsdorf,
 - Carwitz (Hans Fallada),
 - Krüseliner Mühle
- Diversaj parolrondoj pri tre variaj temoj.
- Babilrondeto kun paro el Svislando pri Esperanto, SEFT kaj iomete GDR-a tempo.

Jen novaĵoj:

- René dankas al ĉiuj subtenantoj pro la nova tendo :-)
- Du paroj ekde SEFT 2017 kuraĝis geedziĝi. Gratulon!



Bildo 1: La nova tendo de René. Dankegon, karaj!



Bildo 2: Kafoklaĉo

Pliaj fotoj sub http://esperanto-nb.de/seft/bildaro_2018_reneo.php

2. Pri SEFT entute

Ekde 1978 ja okazis jam SEFT. Ĝis la 40-a SEFT en 2017 partoprenis 625 diversaj personoj el 19 landoj, nome: GDR, FRG, (ekde 1991 Germanujo), Hungario, ĈSSR, Pollando, Britio, Bulgario, Sovetunio, Danujo, Slovenio, Nederlando, Francujo, Svislando, Litovio, Usono, Italio, Kubo, Hongkongo, Aŭstralio. Sed en tio ankoraŭ mankas la informoj el 2014, ĉar ial la koncerna adresaro estis malaperinta. Ĝi reaperis nur dum la ĉijara SEFT.

Kelkaj SEFT-anoj kreas novan kronikon. Bonvolu sendi fotojn kun nomindikoj (se la koncernuloj ne petis pri anonimeco), jaro kaj pliaj detaloj, por ĝi al la jena adreso: seft-bildoj-kroniko@gmx.net

SEFT 2019 okazos **de la 13-a ĝis la 21-a de julio 2019**. Bonvolu atenti la personan aliĝon ĉe la tendejo ĝis la 31-a de marto 2019!

3. Video pri librojservoj

La 11-an de julio 2018 Reneo hazarde trovis kaj spektis videon pri esperantaj librojservoj.

Jen la ligilo <https://www.youtube.com/watch?v=jPUCICdFIkM>

4. PREMIOJ DE FONDAĴO ANTONI GRABOWSKI al Berlinano

Atingis nin la jena informo:

La duan premion (400 us.dolaroj) ricevas Gonalo Neves (Portugalia) kaj **Bernhard Pabst** (Germanio) pro sia komune kompilita Historia vortaro de Esperanto 1887–1889. Tio estas konkordanco, kiu notas iun unuan uzon de vorto en la komenc-tempa epoko de Esperanto; iniciatis in Reinhard Haupenthal. Ambaŭ honoritoj aktivis ankaŭ alikampe (Neves i-jare per la kolektoj Periskope kaj Recenze), sed la premio celas esprimi laŭdon al ili pro la (daŭranta) projekto dokumenti la originon de la lingvo Esperanto.

Gratulon al iuj

5. ardenfesto

La **18-an de aŭgusto 2018** okazos la ijara ardenfesto en Pragsdorf.

Programo:

- Je 11-a horo alveno de partoprenantoj,
- Komune estos farata bongusta supo kun kelkaj helpantoj,
- Lingvaj ekzercoj, efe pri ardenaj fruktoj,
- Kafoklao kun raportoj pri okazaĵoj en esperantujo,
- Vespermanĝo

6. Pliaj datoj

Je la **19-a de septembro 2018** okazos societa kunveno kun ekskurso al la urbeto Demmin.

Demmin estas malnova pomeria hansourbo kun ria historio. Ni vizitos la urban kirkon, la malnovan centron. la muzeon kaj, se eblas, ankaŭ la malnovan burgoruinon („Haus Demmin“). Demmin situas apud tri riveroj: Peene, Trebel, Tollense.

Ekveturo per trajno el NB: ekde la 08.44 horo, alveno en Demmin: 09.50 horo,

Reveturo el Demmin: aŭ je la 16.46 horo aŭ je la 17.46 horo, kion ni ankoraŭ surloke decidus.

Surloke ni matene manĝetos, tagmanĝos kaj kafoklaos je propraj kostoj.

7. 96-a Germana Esperanto-Kongreso en 2019

La sekvontjara Germana Esperanto-Kongreso okazos en norda Germanujo, nome en Neumünster, **de la 7-a is 10-a de junio 2019**. Pliaj informoj jam trovieblas sur <https://www.esperanto.de/eo/enhavo/invitilo-0>

Anschriften / Adresaro

Redakteur: René Philipp, Pablo-Neruda-Ring 69, DE 17235 Neustrelitz.
tlustulimu@web.de (Achtung: René hat außerdem eine neue Emailadresse:
rene_philipp_ntz@gmx.de!)

Geschäftsstellen

LAMA, Landesverband MV

DE-17034-Neubrandenburg, Uns Hüsung 29/0705

Tel. 0395 422 13 98

Bankverbindung: Inhaber: Landesverband Mecklenburg Vorpommern des DEB,
Sparkasse Neubrandenburg-Demmin, IBAN: DE19 1505 0200 3200 0213 48, BIC:
NOLADE21NBS

e.-Brief: info@esperanto-nb.de

Esperanto-Verein Neubrandenburg e. V. (EVN)

DE-17034-Neubrandenburg, Uns Hüsung 29 /0705

Tel. 0395 422 13 98

e.-Brief: info@esperanto-nb.de